# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (898) • 2013 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



La malnova preĝejo de Ignaberga en suda Svedio (paĝo19)

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 311 241 406; 💻 polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Nygatan 10 A; S-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Mortiga aŭ viviga akvo | 3 |
| Pri la mildeco | 5 |
| Skizoj pri filozofoj-kuracistoj VII | 6 |
| Enkonduko historia: religioj | 9 |
| Tragedio kaj Triumfo en Ekvadoro | 14 |
| Plurŝtupa akcepto de kristanismo en Svedio | 17 |
| Vizito al somera kirko | 19 |
| Svitavy kaj kongresaj aliĝintoj | 20 |
| TOLE salutas kaj invitas | 21 |
| Novaĵo el Esperantomuzeo | 22 |
| Nekrologo Anna-Liisa Heikkinen | 23 |
| Spirito de Di' | 24 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Ĉi-numere multaj artikoloj el diversaj vidpunktoj pritraktas la kristanan historion. Multaj antaŭuloj preparis la vojon por ke ni estu kie ni nun estas. Tra la historio la kristana kredo, la fido je nia Sinjoro fortigis homojn, kiuj laŭ sia kredo kaj iu interna ardo siamaniere laboris por disvastigi aŭ fortigi la Dian Regnon surtere. Io vivis forte en ili.

Kie ni estus sen tiuj antaŭuloj? Pro tio la kristana historio multe interesigas min kaj mi esperas ke la artikoloj ĉi-numere same multe plaĉas al vi kiel ili plaĉis al mi.

Somere mi trovis malgrandan faldfolion kiun la Sveda Eklezio disdonas. En ĝi mi trovis la jenan difinon kaj sumigon de la kristana kredo:

*La kristana kredo estas fido, apogo tra lumo kaj mallumo, io portanta, komuneco kaj ĝojo.*

Bonan legadon!

# Mortiga aŭ viviga akvo

Philippe COUSSON, FR

Fakuloj pri geopolitiko diras ke la baldaŭaj militoj ne plu okazos pro la aliro al energio, al petrolo aŭ gaso, sed pro la aliro al akvo. Sufiĉas rigardi kio okazas en Mezoriento aŭ en Nordameriko ĉirkaŭ la riveroj Jordano, Eŭfrato aŭ Kolorado. Akvo estas tiel grava ke neniu registaro povas neglekti ĝian haveblecon. Kaj neniu registaro neglektas tion.

En pluraj landoj, kiel ekzemple Aŭstralio, seka periodo sekvas inundan periodon. Tro da akvo aŭ manko da akvo kaŭzas katastrofojn. Malpli grandskale tio okazas ankaŭ en Eŭropo. La agrikulturistoj plendas kiam ili ne povas akvumi siajn kampojn, kaj ili plendas kiam superfluo de rivero detruas la rikoltojn aŭ mortigas la brutaron. Estas plezuro vivi apud rivero kaj ĝui ĝian freŝecon, sed estas terura damaĝo kiam tiu rivero etendiĝas en la apuda kamparo kaj ankaŭ atingas la domojn kaj fabrikojn, kiujn oni senprudente konstruis ĝuste tie.

Nia moderna teknika mondo havas kiel konsekvencojn, ke ĝi poluas la medion, inter alie la akvon. Sufiĉas memori kelkajn gravajn akcidentojn, kiel la ruĝa tajdo en Hungario, por ne paroli pri la multloka poluado de la subteraj akvotavoloj. Ankaŭ la agrikulturistoj poluas, ĉu per la sterkaĵoj, ĉu per la etendado de la fekaĵoj de intensaj bredejoj de porkoj aŭ kokidoj. La rezulto estas tiuj verdaj tajdoj sur la plaĝoj de Bretonio pro multigo de algoj. Ne nur tio poluas la maron. La homoj ĵetis en la maron multajn aferojn, kiel radioaktivajn restaĵojn, por ne paroli pri la rubujoj, kiujn oni poste retrovas kaj devas forpreni de la plaĝoj. Ankaŭ por ne paroli pri la petrolŝipoj kiuj sinkas kaj malpurigas multajn kilometrojn da marbordo.

Nia nuntempa mondo pli kaj pli kondukas la akvon al la stato de akvo de morto, morto de la medio, morto de la homo, morto de la mondo. Kiel estos ĉe niaj pranepoj?

Por la vivo, akvo estas nepre necesa, por la vivo materia. Kaj tiu neceseco de akvo estas ankaŭ bildo spirita. La homo bezonas la spiritan akvon de vivo, la vivakvon.

Tra la tuta Biblio kuras la akvo, ekde Genezo ĝis Apokalipso. En Genezo, preskaŭ tuj aperas akvo, super kiu ŝvebas la Spirito. Oni ankaŭ rapide aŭdas pri la riveroj kiuj akvumas la ĝardenon de Edeno. En Apokalipso, oni ankaŭ legas pri alia rivero, tiu kiu eliras el la trono de Dio, kaj kiu akvumas arbojn, kiuj produktas fruktojn por nutri kaj foliojn por sanigi.

Jesuo diris ke li estas la vivakvo. Al la Samarianino, li parolis pri tiu vivakvo, kiu plene malsoifigas. Li estis tiam apud puto, ĉar la plejparto de la lando estas senrivera, krom unu, Jordano. En tiu rivero, kiu kuras de la Libanaj montoj tra la Galilea maro ĝis la Morta maro,

li estis baptita de Johano. En tiu sama rivero venis por sin bani laŭ la peto de la profeto la siria generalo Naaman kaj poste li resaniĝis el sia lepro. Tiu akvo estis vivakvo.

La akvo de la bapto estas la signo de tiu purigado. Ne la baptakvo mem purigas, sed ĝi indikas, predikas, la jam ofertitan, donacitan, donitan purigadon pro la morto kaj releviĝo de Jesuo. Tiu vivakvo estas la signo de la agado de Dio en nia mondo. Ĝi indikas la intencon de Dio rilate nian mondon, ĝi montras lian amon, lian pravigon, lian justecon.

Ni ĉiuj scias, ke la akvo estas esenca por la vivo, por ke vivo estu ebla. Same la spirita vivakvo estas esenca, necesa por la spirita vivo. La vivo naskiĝis en la akvo, en iu praa oceano. Ĉiu vivanta estaĵo plejparte konsistas el akvo. Sen akvo la vivo malaperus. Kelkaj estaĵoj vivas en sekegaj kondiĉoj, sed ili tamen bezonas akvon, iun kvanton.

Soifo estas teruraĵo. Oni povas vivi relative longan periodon sen manĝi, sed multe malpli longan periodon sen trinki. Oni mortus pro soifo antaŭ ol oni mortus pro malsato kiam oni ne povas trinki.

Kion Jesuo diris al la Samarianino, kiam li parolis pri soifo kaj la vivakvo, signifis ne ke ŝi ne plu bezonus trinki akvon, sed ke la spirita vivo bezonas la spiritan vivakvon, kaj tiu vivakvo estas ĝuste li. Tiu kiu tiun akvon trinkos, neniam plu suferos la spiritan soifon.

Plie, li mem fariĝos fonto de akvo, de vivakvo. Tiu vivakvo kiu venos el la disĉiploj estos ankaŭ spirita akvo. Ĝi estos la manifestiĝo de la venanta Regno de Dio. La kredantoj estas vokitaj por esti la akvo kiu alportas al la mondo la vivon, la purigadon, la riparon, la sanigon, entute la amon, kiun ili ricevis de la Vivakvo, de Dio mem.

Pro la vivakvo kiun ili ricevis, la kredantoj alportu la vivon, la amon, la repacigon, la pacon, anstataŭ la militon aŭ la katastrofon. Tio ja estas ilia respondeco.

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

**29. januaro**

Mia Savanto, mi tamen enspiru aeron de la eterneco tie ĉi sur la tero kun ĝia putreco. La fortiganta vento de la altaj montoj de Dio venadu al mia ebenaĵo kaj donacadu al mi novajn fortojn, por ke mi servu miajn geamikojn.




Tiun-ĉi libreton Vi povas mendi ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 2). Per la aĉeto Vi subtenas la agadon de Stichting Zienderogen, kiun iniciatis Jacques Tuinder.

# Pri la mildeco

Julia SIGMOND, RO/IT

"Ĉi ne tro interpremiĝis, kiam la Bonadio distribuadis la mildecon!" – oni diris al mi ofte dum mia junaĝo. Kaj tio vere veras!

Mi ne naskiĝis milda. Sed ĉiam mi alte taksis ĉi mirindan homan econ. Tio kaŭzis, ke dum mia tuta vivo, fakte en ĉiu mia vivoparto, miaj plej bonaj amikinoj estis mildaj.

Pro la mondmilito iom pli malfrue ol kutime mi ricevis la konfirmacion je mia 16 jaraĝo en unitaria preĝejo. Tiam mi ricevis donace mian unuan Biblion de mia onklino Ilona. Tuj mi eklegis ĝin kaj pli ol unu jaro pasis, kiam de la Mondokreado mi atingis la Apokalipson de Johano. Sincere mi konfesas, ke malrapide kaj sufiĉe malfacile mi transronĝis la Malnovan Testamenton, kvankam ĉiuvespere mi legis, sed kiam mi atingis kaj eklegis la Novan Testamenton, kun multe pli granda inklino mi konatiĝis kun la Sankta Skribo. Ankaŭ nun ofte mi prenas en la manojn la Biblion kaj legas la plej ŝatatajn partojn.

Kiam mi legis la unuan fojon laŭ Mateo, kiuj estas la feliĉuloj, mi ektristetis. Parte, mi ne komprenis ĉion, aliparte mi tion pensis, ke neniam mi estos vere kaj perfekte feliĉa, ĉar mi ne povas, sed eble eĉ ne volas esti milda.

Kiu n u n konatiĝas kun mi, tiu pensas, ke mi estas milda aĝa onjo. Tiu ne povus kredi, eĉ ne imagi, ke danke al memeduko, kun helpo de terura fortostreĉo, mi provis ĉiamaniere ellerni, kiel eblas esti milda?!

Bedaŭrinde, eĉ nun, oldiĝinte okazas, ke mi forgesas mian malnovan decidon: mi volas esti milda! Poste, ofendante iun, malgaje mi konstatas: se mi estintus pli milda, mi ne devus nun pardonpeti!

Laŭ ĝenerala opinio la mildeco estas ĉefe virina virto. Tamen, kiel modelon imitindan, oni mencias la mildecon de viro. Jes, mi pensas pri Jesuo. Laŭ mia scio, li nur unusolan fojon ne estis milda, kiam en Jerusalemo li purigis la preĝejon, forigante de tie la vendistojn, renversante la tablojn de la monŝanĝistoj. Cetere Jesuon karakterizis ekzemplodona mildeco.

Ne facilas milda esti! Sed meritas! Precipe, se konscie ni estas mildaj. Pli facila estas la vivo por tiuj, kiuj denaske estas mildaj. Por ili la mildeco estas natura stato. Sed kiuj ne naskiĝas mildaj??? Nu, tiuj unue devas ekscii, kion fakte signifas la vorto milda.

Eksciu do: milda estas tiu, en kiu mankas la perforto, la sovaĝeco, la krudeco, la brutaleco, la barbareco, kiu estas cedema, akordiĝema, kvieta, malagresema, amoplena kaj amikema.

"*Feliĉaj estas la mildaj, ĉar ili heredos la teron.*"

# Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, VII

## Memmortigo de la racio: Karl Jaspers (1883-1969)

DUDICH, Endre, HU

*"Ĉiu science prilaborita*
*mondkoncepto estas falsa"*
K. Jaspers

### 1 Vivo kaj verkado

La germano Karl Theodor Jaspers (1883 Oldenburg – 1969 Basel) estas elstara figuro de la ekzist(encial)ismo kaj irracionalismo (kontraŭraciismo) en la eŭropa filozofio. Lia pensmaniero kaj idearo spegulas kaj bonege ilustras la profundan mensan kaj moralan krizon, kiun la dua mondmilito provokis en la intelektularo de Eŭropo.

Jaspers komence studis jurisprudencon. Sed li baldaŭ ŝanĝis vivovojon kaj iĝis kuracisto, specialisto pri psikopatologio kaj psikoanalizo.

La skolo de S. Freund prilaboris la teorion de psikoanalizo de la subkonscio, surbaze de la psikopatologiaj spertoj, por apliki ĝin en la medicina praktiko.



K.Jaspers esploris plurajn tavolojn de la individua homa konscio, por tiri filozofiajn konkludojn.

La prestiĝa universitato de Heidelberg invitis lin kiel profesoron al la katedro de filozofio. Dum la reĝimo de A. Hitler en 1937 Jaspers perdis tiun postenon, ĉar lia edzino estis judino. En 1945 li rehavis ĝin, sed prudente moviĝis al Svislando, kaj iĝis profesoro en la universitato de Basel.

### 2 Bazaj konceptoj


La bazaj konceptoj de la filozofiado de Jaspers estas jenaj (en alfabeta ordo):

- Ampleksanto (das Umgreifende), finfine Dio
- Ĉi-tie-esto (Dasein)
- Decido (Entscheidung)
- Disiĝo (Spaltung) de la objekto kaj subjekto
- Fenomeno (Phänomen)
- Filozofia kredo (Philosophische Glaube)
- "Kaŝita Dio" (Deus absconditus)

- Limoj, limsituacioj (Grenzen, Grenzsituationen)
- Malfilozofio (Unphilosophie)
- Memrealiĝo (Selbstverwirklichung)
- Nepro (das Unbedingte)
- Salto (Sprung), akto de volo
- Vereco (Wahrhaftigkeit, anstataŭ la vero (Wahrheit)
- Volo (Wille), kiel gravega psika faktoro

La centra kaj plej grava nocio, la ekzistenco estas tre malfacile difinebla. Mi citas tri el la "difinoj" donitaj de Jaspers.

1. Ekzistenco estas tio, kio neniam iĝas objekto, sed estas la origino de niaj penso kaj ago, pri kio ni parolas per vico de tiaj pensoj, kiuj konas nenion.
2. La ekzistenco estas tio, kio rilatas al vi mem kaj per vi mem al la transcendanto.
3. La liberecon de la homo ni nomas ankaŭ ekzistenco.


Allgemeine
Psychopathologie
Ein Leitfaden für Studierende, Ärzte und Psychologen
Von
Dr. Karl Jaspers
Wiss. Assist. an der psychiatrischen Klinik in Heidelberg
Berlin
Verlag von Julius Springer
1913

## 3 Tezoj kaj vojoj

Jen tri karakterizaj citaĵoj el la Filozofia kredo.

(A) La Ampleksanto… ĉi tio estas aŭ la esto en si mem kiu ĉirkaŭas nin, aŭ tiu esto, kiu estas ni mem. La eston, kiu ĉirkaŭas nin, ni nomas mondo kaj transcendenco. Al tiu esto, kiu estas ni mem, ni donas la nomojn ĉeesto, konscienco entute, spirito, respektive ekzistenco.

(B) Kiel la esto kaj la nenio estas ne-apartigeblaj, unu estas en la alia, kaj poste ili troviĝas la plej malproksime unu de la alia, same formas unuon la kredo kaj la malkredo, kaj troviĝas poste, per pasia forto, malproksime unu de la alia.

(C) Ĉio kion ni scias, ekzistas en la dividiteco subjekto – objekto. Ne ekzistas objekto sen subjekto, nek subjekto sen objekto.

La filozofia kredo de Jaspers havas kvin ĉefajn tezojn. Ili sendube memorigas onin al tiuj de Immanuel Kant – kaj tute ne hazarde.

1. Dio ekzistas
2. La nepro transformas la nuran ekziston je ekzistenco.
3. La realeco de la mondo estas malaperanta.
4. La homo estas finhava sed nefinigebla.

5. Dio gvidas nin pere de nia libereco.

La metafiziko de Jaspers montras tri vojojn de supreniĝo de la homa ekzistenco al la transcenda Unuo, la origino de la Esto.

(a) Koncepte transcendi la objektojn (fakte nur fenomenojn) de la mondo.
(b) Pasi per la rilatoj de la ekzistenco, pere de liberaj decidoj, al la transcendenco..
(c) Deŝifri la signojn de dio (aperantajn en ĉio).

Tiamaniere Jaspers, kiu komencis la filozofiadon per akra kritiko kaj senindulga dubo pri la homa ekkonkapablo, finiĝas kiel moderna mistikulo, kiu kredas je la ebleco de unuiĝo de la homo kun Dio.

Tio distingas lin gravege de la ceteraj "ĉefprofetoj" de la ekzistencialismo. Tiuj estas:

- La du famaj francoj, Jean-Paul Sartre kaj Albert Camus, kiuj estis fieraj kaj agresemaj ateistoj,
- La germano Martin Heidegger, kiu malgraŭ brilaj spritaĵoj finfine kontentiĝis esti poezie altnivela panteisto.

Menciindas, ke Jaspers korespondadis kun Heidegger dum kvardek jaroj, ekde 1923 ĝis 1963.

## 4 Verkoj de K. Jaspers

- Ĝenerala psikopatologio, 1913
- Psikologio de la mondkonceptoj,1919
- Filozofio I-III, 1923 -1932
- Racio kaj ekzistenco, 1935
- Nietzsche, 1936
- La atombombo kaj la estonto. Politika konscio en nia tempo, 1946
- Pri la vero. Unua parto de la filozofia logiko, 1947
- La filozofia kredo, 1947
- Pri la origino kaj celo de la historio, 1949
- La problemo de senmitigo, 1950
- Nietzsche. Enkonduko al la kompreno de lia filozofiado, 1950
- La grandeco kaj la fato de Schelling, 1955
- La grandaj filozofoj, 1957
- Platono, Aŭgusteno kaj Kant. La tri fondintoj de la filozofio, 1961
- Nikolao Kusano, 1964
- La filozofia kredo konfrontita al la revelacio, 1964
- Dekarto (Kartezio) kaj la filozofio, 1966
- Lernejeto de la filozofia pensado, 1967
- Enkonduko al la filozofio, 1969
- La ideo de la universitato, 1973

## 5 El la retpaĝo

http://www.sulinet.hu/tovabbtan/felveteli/ttkuj/filozofia/filozofia16.html

# Enkonduko historia –

## gravaj ĉapitroj el la kultura historio: religioj

### el la enkondukaj ĉapitroj por ANTOLOGIO LATINA 5, tria parto

Gerrit BERVELING, NL

Por multaj nuntempaj homoj, certe por tiuj el la ne-Eŭropaj kulturoj, sed ankaŭ por multe da Eŭropanoj (kaj Nord-Amerikanoj) kiuj ne plu estas kristane edukitaj, povas iom fremdige efiki, se en nia *Antologio Latina* ĉi tie ni enŝovas sufiĉe detalan ĉapitron pri teologiaj demandoj. Se tio okazos en volumoj, kiuj traktas la Mezepokon, tion oni certe pardonos al ni, sed ĉi tie... nu, oni eble iom hezitos.

Por klarigi, mi povas substreki, ke en la nun traktata periodo certasence *formiĝis* la kristana tradicio. Ĝis tiam ĝi ankoraŭ estis sufiĉe senkohera kaj varia, sed en tiuj ĉi jarcentoj unueciĝis kaj la eklezia strukturo kaj la doktrina ortodokseco. Kaj kiel sciate, ĝuste la kombino de la Greka-Romia heredaĵo kaj la Juda-kristana tradicio kune formas la bazon de nia nuna Eŭropa kulturo.

Tial estas utile iom detale trakti, kiel estiĝis tiu kristana tradicio.

Unue, kristanismo estas religie pluralisma movado, kiu estiĝis kiel reago al la agado de Jesuo de Nazaret kiel Mesio – aŭ Greke: Kristo[1], kaj de ties lernintoj. Tiu movado, en kiu ajn konkreta formo ni renkontas ĝin, sin mem kutime nomas *Eklezio*. Por ni nunuloj estas memkompreneble, ke ĝin formis la kristana Biblio, kiu – kontraste kun la Juda Biblio[2] – konsistas el du partoj: la Olda Testamento kaj la Nova Testamento[3]. Sed ĉi tie por multaj finiĝas la scio. Tamen, ne estas *aŭtomate* vera, ke la Biblio konsistas el O.T. plus N.T., ĉar ja ekzistis sufiĉe fortaj tendencoj interne de la frua kristanismo, kiuj strebis elimini la Oldan Testamenton. La fruaj kristanoj parte estis ankoraŭ de Juda deveno, sed tre baldaŭ – kaj decidige! – superregis la novkonvertitoj el la ceteraj popoloj (la gojoj). Kaj legante la Biblion, tiuj ĉi laste menciitoj ofte havis kiel grandan problemon, ke unuavide en la Olda Testamento renkontiĝas iu Dio, kiu estas sufiĉe naciisma, kiu ordonas mortigi la malamikojn de la Hebreoj, eĉ ekstermi tutajn urbojn da ili, dum en la Nova Testamento, en la Patro de Jesuo ili precipe vidis Dion plenan je amo kaj kompatemo. Do, laŭ pluraj, tio devas esti du malsamaj Dioj. Kaj ĉar la Dion de Jesuo oni intencis sekvi, la alian oni ne povas akcepti samtempe.

Precipe kristanaj gnostikuloj (Gnostiko venas de la vorto *gnosis*[4]) estis tre radikalaj tiuteme.

**Marciono** fariĝis la plej fama inter ili. Li devenis el Ponto (ĉe la Nigra Maro) kaj depost la jaro 144 kontraŭbatalis la katolikan[5] formon de kristanismo. Laŭ li ĝi estis 'Jude infektita', kompare kun

la origina movado de Jesuo. La antagonismon inter *Torao* kaj *Evangelio*, kiun kelkfoje eblas konstati ĉe Paŭlo, li kulminigis, kaj la Toraon – fakte la tutan Oldan Testamenton – li komplete malakceptis, ĉar ĝi estis liajuĝe la libro de la 'kontraŭ-Dio' kiu kreis ĉi tiun mondon. Laŭ Marciono, Jesuo per kompleta pardono de ĉiuj pekoj estis turninta sin kontraŭ la Dio de l' Olda Testamento, kaj sekve ankaŭ kontraŭ ĉi tiu mankohave kreita mondo nia. Tial li metis grandan emfazon sur askezo. El la Nova Testamento nur la leterojn de Paŭlo li akceptis kaj la evangelion laŭ Luko[6], kiun li konsideris disĉiplo – lerninto – de Paŭlo. Marciono per sia kritiko fakte 'inventis' la unuan kanonon de l' Nova Testamento.

La eklezio, kiun fondis Marciono, rapide kvazaŭ konkurenculo disvastiĝis apud la 'katolika' movado kaj pluekzistis ĝis en la 4a jc. Multaj ĝiaj anoj mortis martire. Fine ĝiaj restaĵoj kunkreskis kun la Maniĥeoj.

**Montanismo** estas kristana movado, kiu estiĝis en la 2-a jc, dank' al la predikado de Montano kaj la profetinoj Priska kaj Maksimila, unue en Frigio (nuna Turkio) sed baldaŭ tra tuta Romia Imperio. Karakteriza por la movado estis granda religia entuziasmo kaj apokalipsa atendado de baldaŭa mondo-fino. Ili ofte parolis glosolalie kaj vivis askete. Interne de la movado oni baldaŭ konsideris Montanon kiel la de Jesuo promesitan *Parakleton* (Joh. 14: 16)[7].

Tertuliano estas la plej konata persono, kiu en certa periodo de sia vivo apartenis al la movado.

**Valentino** (naskita ĉ 100 en Egiptio) laboris meze de la 2a jc (ĉ 135-160/65) en Romo. Laŭdire tiu ĉi fama gnostika gvidanto unue esperis fariĝi la nova tiea episkopo (papo), sed kiam post la elekto de Pio la 1-a tio montriĝis neebla, li multe pli detaligis siajn kosmologiemistikajn instruojn pri gnostiko. Lia movado nomiĝas la Valentinanoj.

Multaj fakuloj estas konvinkitaj, ke la *Evangelio de la Vero*, kiun en 1945 oni retrovis en traduko inter la Kopta biblioteko[8] de Nag Hammadi, Egiptio, estas lia verko. Ĝis tiam pri ĉi tiu gnostika branĉo oni nur sciis, kion skribas kontraŭuloj.

## Gnostiko

Plurfoje ni jam uzis la vorton *Gnostiko*. Eble ni iom traktu ĝin: Gnostiko estas religie orientita pensmaniero, kiu ekde la 2-a jc p.Kr. disvastiĝis en kaj ankaŭ ekster la Romia Imperio. Iel eblas rigardi ĝin unu el la rezultoj de l' kultura renkontiĝo Helenisma, en kiu kontaktiĝis la Greka (=Helena) kulturo kaj la Mezorienta mondo. Se rigardi la Grekan flankon, certe gravas la filozofio, precipe Platonismo, kaj orfismo (malnova sufiĉe mistike orientita religio, kies heroo estis Orfeo). Ankaŭ troviĝas gravaj radikoj de gnostiko en la praa Persio.

Ekzistis pluraj gnostikaj sektoj, kelkaj relative proksimaj je kristanismo, kiujn la eklezio kontraŭbatalis kiel herezaĵojn; aliaj tendencoj ne havis kristanan flankon. Hermetismo, ekzemple, estas speco de gnostiko kiu rilatas al la religio de l' malnova Egiptio, precipe kun ĝia Dio Thot, greklingve Hermeso. Unu el la plej influaj kristanaj gnostikaj skoloj estis tiu de Valentino.

Laŭ gnostiko, la homo povas atingi saviĝon pere de *gnosis*, ezotera scio. Tiu scio koncernas la mondon de l' O Dia kaj de la superteraj estaĵoj, sed ĝi ankaŭ liveras komprenon pri la homa ekzisto ĉi-tera, pli rekte pri la homa esenco. Estas dualismo de *spirito* kaj *materio*. La materio estas malpli valora kaj efektive devenas de l' O Malbona. La homo, tamen, dank' al Dia sparko en la interno, estas parenca je Dio, kiun gnostikuloj kutime nomas la Patro. Scio pri Dio tial certasence identas je scio pri sia plej intima memo. La gnostiko estas tre negativa koncerne la konkretan materian mondon: ĉion palpeblan kreis la malbonaj fortoj. La spirito devas liberigi sin el sia ligiteco al la korpo, al la materio. Se iu homo atingas la *scion*, tio estas la spirita resurekto de tiu homo. Kristo estas la instruanto de tiu scio.

Laŭ kelkaj, la homoj dividiĝas en tri grupojn: tiuj homoj, kiuj havas en si la Dian sparkon, kaj kiuj sekve kapablas saviĝi, se *scion* ili atingas. Due la *hylici*[9], t.e. la nur-materiaj homoj, al kiuj mankas la spirita bazo por esti savitaj. Ili, se diri simplige, ja ne posedas animon, estas nur eksteraĵo. Kaj trie la t.n. *psychici*[10], kiuj ja ne atingos la veran *scion*, sed kiuj tamen – farante bonajn agojn – povos atingi certan feliĉecon. Koncerne la ekeston de spiritaj potencoj, anĝeloj, homoj ktp, la gnostiko ne deiras de iu origina kreado fare de Dio, sed de emaniĝo el Dio. Spiritaj estaĵoj estas emaniĝoj el la Patro. La palpebla materia mondo estas kreita ne de la plej alta Dio mem, kiun oni ja ne rajtas respondecigi pri tiu ĉi neperfekta universo nia, sed de iu malpli supera 'Dio', la Demiurgo[11].

La spiritaj estaĵoj, la anĝeloj kaj la 'Diaj sparkoj' interne de l' homoj (= la animoj) devos liberiĝi el ĉiu ligiteco al la neperfekta, por finfine returniĝi al Dio mem, por ke 'Dio estu ĉio en ĉiuj'.

La gnostiko tre ofte parolas pri la plej supera Dio kiel 'la nekonata Dio', kiu transcendas ĉiun nian komprenon.

La karakterizaĵoj de tiu Dio ofte estas personigitaj en t.n. hipostazoj, la Dia Pensado, la Providenco, ktp. Al tiu 'Dia *pleroma* (kompleteco)' apartenas fakte ankaŭ la Eklezio kaj la Homo. Ĉar laŭ Dia kerno ankaŭ ĉiu homo iel apartenas en Dio.

Kelkaj gnostikaj skoloj havis komplikajn instruojn pri multaj tavoloj da anĝeloj kaj demonoj. Aliaj laboris ankaŭ kun kaŝitaj nomoj aŭ sorĉ-formuloj.

Ĝis en la mezo de l' 20-a jc p.Kr. nia scio pri gnostiko grandparte dependis de la literaturo de kristanaj teologoj, kiuj atakis kaj kondamnis tiun movadon. Ilia prezentado, bedaŭrinde, ne ĉiam estis tre objektiva, kvankam la trovaĵoj de 1945 en Nag Hammadi (Egiptio), kie kompletan gnostikan bibliotekon oni elfosis, pruvis, ke iliaj citaĵoj el gnostikaj tekstoj kutime estis sufiĉe fidindaj.

En la 20-a jc, kiel iaspeca reago, estiĝis eĉ novspeca gnostiko: ie tie fondiĝis gnostikaj eklezioj eĉ kun episkopoj. Tiu ĉi speco de gnostiko ne transprenis la ege negativan sintenon de la frua gnostiko rilate al la homa korpo.

## Maniĥeismo

Maniĥeismo[12] ne estas nur kristana movado, sed havas tamen multajn rilatojn kun kristanaj movadoj. Ĝi estas religio, fondita de la profeto Mani (ĉ 215-275), kiu devenis el Juda-kristana

baptista sekto en Persio. Surbaze de siaj vizioj li predikis religion de interkompreniĝo kaj toleremo, kiun kutime oni nomas sinkretisma. En siaj leteroj li ĉiam nomas sin 'apostolo de Kristo'. Post vojaĝoj al Hindio kaj – laŭdire – eĉ ĝis en Ĉinio, li revenis al la kortego de la Persa reĝo. Li mortis krucumite sub nova reĝo, viktimo de l' malamo de la pastroj de Zaratuŝtro. Postrestas de li pluraj sanktaj skriboj.

Aŭgustino dum siaj junaj jaroj relative longe estis aktiva 'aŭskultanto' (unuagrada inicito) en tiu religia movado. En la 20-a jc dank' al trovaĵoj en Turfan (Turkestan, Ĉinio), Medinet Madi (Egiptio) k.a., oni malkovris multajn originalajn tekstojn de Maniĥeismo, kiun ĝis tiam oni nur svage konis dank' al citoj ĉe ĝiaj kontraŭuloj.

Maniĥeismo multrilate similas je gnostiko. Tamen ĝi havas specifajn trajtojn, kiuj faras ĝin pli universala religio. La 'mitologio' de l' Maniĥeismo rakontas pri emaniĝoj el la plej supera Dio. Krome ekzistas iu eterna Kontraŭ-Dio, la Mastro de l' Mallumo. Tiu forto de l' mallumo atakis kaj parte forkaperis spiritajn estaĵojn el la regno de l' lumo. Per tio, komence de l' historio de la universo, komenciĝis longa batalado. La supera Dio (estro de la lumo) sendis la prahomon, kaj sendis la vivantan Spiriton por subteni lin. Celo estis konsciigi ĉiujn lum-elementojn kaptitajn en la – malbona – materia mondo (la animojn) kaj savi ilin retro al la regno de l' lumo. Jesuo estis sendita de Dio por diskonigi tiun *scion*. Pluraj animoj, kiuj iel jam estis savitaj, tamen pro amo al la cetera mondo rifuzas jam enlumiĝi, sed unue volas ankoraŭ labori en nia mondo por savi pli



Mani el Vikipedio

da animoj el la mallumo. Mani estis la lasta en la serio da profetoj, senditaj de Dio por helpi al la homaro retrovi sian originan destinon: Zaratuŝtro, Budho, Jesuo... Li estas la *Parakleto*. La Maniĥeaj komunumoj konsistis el du gradoj: la aŭskultantoj kaj la elektitoj. La dua grado estis pli intime inicita en la misteroj de l' *scio* kaj vivis askete, sen seksaj rilatoj, vegetare kaj senalkohole. La aŭskultantoj estis devigitaj obei certajn moralajn regulojn kaj subteni la elektitojn. Ĉefo de la komunumo (eklezio) estis iaspeca papo aŭ imamo, unue en Babilono, poste en Samarkand. Loke – regione – ili konis episkopojn kaj presbiterojn. La diservo grandparte konsistis en preĝado kaj fastado; ĝi ne konis statuojn aŭ oferojn de bestoj, ĉar mortigo estis severe malpermesita.

Maniĥeismo rapide disvastiĝis orienten ĝis en Ĉinio (kie oni retrovis en la 20-a jc plurajn sanktajn tekstojn) kaj okcidente ĝis en Sud-Francio kaj Hispanio; ĝia influo je Kristanismo kaj Islamo estis grandega.

1 Kristo / Ĥristo = Sanktoleito, same kiel la Hebrea vorto Maŝiaĥ / Grekigite: Mesio. Arabe: Masiĥ, troveblas en Korano.

2 TeNaĤ: Torao, Profetoj kaj ceteraj Skriboj. L.L. Zamenhof – kiel Judo / Hebreo, kiel li mem nomis sin – tradukis kompreneble nur tiun Hebrean tekstaron. Li efektive deziregis, ke aperu memstara eldono precipe por la utilo de liaj samgentanoj. Ĝi bedaŭrinde ankoraŭ ne aperis.

3 En pluraj volumoj aperis mia nova traduko pri NT kun iom da komentoj: *leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo*; *La Bona Mesaĝo de Jesuo* en kvar volumetoj *Laŭ Marko / laŭ Mateo / laŭ Luko / laŭ Johano*; *Flanke je Jesuo*. Ankaŭ la ne-Hebrean parton de *Malnova Testamento* (alivorte *Duakanonaj Libroj* aŭ – protestantece – *Apokrifoj*) mi tradukis el la originalo: *La Duakanonaj Libroj* 1 + 2 + 3.

4 La Greka vorto por *scio*, de kiu devenas la vorto *gnostiko* por la tuta pens-movado.

5 *Katolika* estas Greka vorto, kiu signifas *ĝenerala*. Nuntempe en la ĝenerala parol-kutimo oni ofte limigas ĝian signifon al unu eklezio, nome tiu de Romo, la Rom-katolika Eklezio. Sed fakte ekzistas ankoraŭ pluraj specoj de t.n. katolikaj eklezioj. Mi menciu pri ekzemple la Prakatolika, la Grek-katolika (ne konfuzu tion kun la Grek-Ortodoksia Eklezio, kiu estas memstara disde Romo), la Episkopa Katolika, la Libera Katolika k.a. eklezioj.

6 Kvankam, se diri pli detale, elinter la konataj leteroj de Paŭlo li jam distingis inter aŭtentaj kaj ne-aŭtentaj eroj, kiujn lastajn li do malakceptis en sia kanono. El la evangelio laŭ Luko li ankaŭ eliminis plurajn partojn, kiuj por li estis tro Judecaj, ekzemple la naskiĝo-rakontojn pri Jesuo. En la moderna teologio depost la 18-a jc multaj liaj temoj revenis.

Por iom resumi, Marciono asertas: 1] la Leĝo Mosea estas sub la homa digno kaj sub la digno de Dio, kiu estas saĝa kaj gracoplena; 2] la Dion, kiu sendis la Mosean Leĝon, ni devas do absolute rifuzi, ĉar obsedas Lin nur justeco (punpagigo kontraste al graco) kaj kiel tia Li malamikas al la homa gento kaj montras sin kreanto de la malbona materia mondo; 3] subite aperis, kiel io plene nova, Jesuo: tiu malkaŝis novan ĝis tiam nekonatan Dion: la amplenan Patron, kiu kreas spacon, kie la homoj estas liberigataj, kaj elsub la Mosea Leĝo, kaj de la Dio kiu kreis la malbonan mondon; 4] sekve, O.T. kiu atestas pri tiu Dio de l' malbonmonda kreo kaj kiu donis la Mosean Leĝon al Izrael, ne plu validas post Jesuo Kristo; 5] nur kelkaj leteroj de Paŭlo (ĉefe tiu al la Galatoj) kaj reviziita formo de la evangelio laŭ Luko estas akceptindaj por kristanoj.

Por defendi la fakton, ke O.T. kaj N.T. apartenas kune, Tertuliano en sia *Kontraŭ Marciono* montras sin ofte ekstreme kontraŭ-Juda: ke Dio en O.T. punas ĝis tria kaj kvara generacioj, tion Li faras pro la obstino de l' Juda popolo, en la espero ke almenaŭ kelkaj iliaj idoj saviĝos finfine. La Mosea Leĝo ne estas pruvo de ia dureco de Dio, kiel asertas Marciono, sed nemiskomprenebla signo de Lia sublima amo por venki ilian obstinecon. La Mosean Leĝon oni kompreneble ne plu obeu, sed ne pro ia senvaloreco flanke de ties Dia doninto, sed ĝi estas, kia ĝi estas, nur pro la popolo al kiu ĝi estis destinita. Por Tertuliano, O.T. estas kvazaŭ skandal-plena kroniko pri tio, kiel la Juda popolo daŭre kaj ripete estis malobea al Dio. Kaj por li tio kulminas en N.T. en la mortigo de l' al ili sendita Mesio Jesuo.

7 Tio signifas, ke laŭ la anoj de l' Montanismo ĉe Montano komenciĝis nova stadio en la Savhistorio de la mondo. Simila identigo kiel la *Parakleto* denove pli poste okazis ankaŭ al la profetoj Mani (de l' Maniĥeoj) kaj Muhammad (de Islamo)

8 La plej fama teksto el ĉi biblioteko estas *La evangelio Kopta laŭ Tomaso*.

9 De la Greka *hylê* = materio.

10 De la Greka *psychê* = animo.

11 Laŭlitere: la Manlaboristo, konstruanto.

12 La vorto venas de *maniĥaj* = *Mani vivas*! Tio estas kredkonfeso: Mani mortis martire – sed li ja *vivas*! Ankaŭ la Maniĥea etimologio, kiun donas Aŭgustino, estas sciinda: μάννα χεῖ = li elverŝas manaon; en sia (sola konata, do kontraŭ-Maniĥea) tempo Aŭgustino mem derivas la nomon de μανία = frenezo.


# Tragedio kaj Triumfo en Ekvadoro

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Je la jaro 1956, la sovaĝa tribo Waodani de Ekvadoro mortigis kvin junajn misiistojn: Jim Elliot, Roger Youderian, Nate Saint, Pete Fleming kaj Ed McCully. La hom-mortigo estis la afero plej grava en la kulturo de la Waodani. Se oni deziris akiri edzinon, ili kutime mortigis la familion de la virino. Iu ajn afero tre malgranda estis kaŭzo por mortigi. Ses el ĉiuj dek mortoj estis hommortigo. La antropologoj kalkulis ke la perforto tiom kreskis, ke en la daŭro de du aŭ tri generacioj la Waodani mortigus sin mem ĝis ne ekzisti plu. Se blankaj homoj aŭ aliaj indiĝenoj alproksimiĝis la teritorion de la Waodani, la sovaĝaj tribanoj mortigis ilin per siaj longaj lancoj.

Tiel danĝeraj estis la Waodani, ke la registaro de Ekvadoro faris planojn por ekstermi ilin per la nacia armeo. Tio estus kiel elimini plagon de ratoj aŭ sovaĝaj hundoj, ĉu ne? Sed tiuj kvin misiistoj estis homoj plenaj de la amo de Kristo. Ili eksciis pri la planoj de la registaro rilate al la Waodani, kaj ili tre ĉagreniĝis. La Waodani estas homoj, por kiuj Kristo mortis sur la kruco, egalaj kiel ĉiuj aliaj homoj! Do, la misiistoj klopodis porti la evangelion de Jesuo Kristo al la sovaĝa tribo.

Unue, ili deziris montri ke ili estas amikoj de la Waodani. Unu el la misi-istoj estis piloto kaj havis aviadilon. Li flugis super vilaĝon de la Waodani. Alia




La retrovita kaj rekonstruita aviadilo, kiun la missistoj uzis. Foto: Mission Aviation Fellowship

misiisto akompanis lin kaj pendigis de la aviadilo korbon plenigitan de hakiloj, battranĉiloj, kaj fiŝhokoj. Kelkfoje, la misiistoj portis donacojn per aviadilo al vilaĝoj de la Waodani. Iufoje, la Waodani metis donacojn en la korbon: plumojn, lignaĵojn kaj tiel plu. Fin-fine, la misiistoj decidis ke jam estas tempo renkonti la tribanojn vizaĝo kontraŭ vizaĝo.

Tiun matenon, la kvin misiistoj ekiris per aviadilo al loko en la rivero proksime al vilaĝo de la Waodani. La edzinoj de la misiistoj sekvis ilian procedon per radiofono. La vojaĝo komenciĝis bone kaj la misiistoj alteriĝis sur la rivero. Ili raportis ke kelkaj Waodani alproksimiĝis. Subite la radiofono silentiĝis. Grupo de soldatoj kaj aliaj personoj ekiris por serĉi la misiistojn. Post tri/kvar tagoj, ili trovis la kadavrojn de la kvin misiistoj. Ili estis kruele buĉitaj per lancoj kaj battranĉiloj. Kvankam ili portis pistolojn kaj fusilojn, ili ne utiligis la armilojn por defendi sin mem.

Ĉu tiuj kvin misiistoj vane mortis? Ni vidu. Kiam la informo pri la mortoj de la misiistoj estis publikigita, centoj de gejunuloj ĉirkaŭ la mondo ofertis sin mem por prediki la evangelion, eĉ al la sovaĝaj murdistoj.

Kelka tempo antaŭ ol la misiistoj klopodis renkonti la tribon, Dayuma, virino de la Waodani, eskapis de la tribo ĉar ŝiaj parencoj estis mortigitaj. Ŝi renkontis Rachel Saint, fratino de Nate. Dayuma lernis la hispanan lingvon kaj, plej grave, ŝi iĝis kristano. Post la morto de la misiistoj, Rachel Saint kaj Elizabeth Elliot, vidvino de unu el la viktimoj, eklernis de Dayuma la lingvon de la Waodani kaj ili ekiris por loĝi en la sovaĝa tribo.

Per la influo kaj la instruado de la misiistinoj, multaj anoj de la Waodani konvertiĝis al Kristo. La hommortigo malaperis de ilia kulturo. (Bona maniero por elimini malamikojn: helpi ilin iĝi amataj kristanaj fratoj, ĉu ne?!) Kelkajn jarojn poste, Steve Saint, kiu havis kvin jarojn kiam lia patro Nate estis mortigita, komencis pasigi tempon kun la tribo. La murdistoj de la misiistoj ne nur konvertiĝis al Kristo, sed kelkaj el ili iĝis pastroj. Kiam Steve havis 13 jarojn, li kaj lia plejaĝa fratino estis baptitaj fare de du el la murdistoj de ilia patro en la sama loko en la rivero kie la misiistoj mortis! Tiel potenca estas la amo de Kristo!

Steve Saint kreskis inter la Waodani kaj ili igis lin ano de la tribo. Steve ofte fiŝkaptis kaj ĉasis simiojn kun la tribanoj. Li bone ellernis utiligi blovpafilon. Kiam Steve estis plejaĝulo, li, lia edzino kaj iliaj gefiloj loĝis dum kelkaj jaroj inter la Waodani. Steve iĝis





Wheaton college memorigas pri Elliot kaj McCully. Foto de Captain Phoebus ĉe Vikipedio

piloto kaj li ofte transportis per aviadilo malsanajn kaj vunditajn Waodani al malsanulejon. Li instruis al iuj el la Waodani esti pilotoj. (Ili nomas aviadilon "ligna abelo".)

Unu el la murdistoj de la patro de Steve nomiĝas Mikaja. Mikaja iĝis pastro kaj li ofte vojaĝis trans la mondo kun Steve, predikante la evangelion. La gefiloj de Steve tre amas Mikaja-n. Mikaja okupas ĉe ili la lokon de la avo kiun li mortigis!

Steve Saint iĝis inĝeniero. Li nuntempe havas kompanion kiu inventas kaj fabrikas ilojn speciale por la uzado de la Waodani kaj aliaj indiĝenaj triboj ĉirkaŭ la mondo. La kompanio fabrikas boatan motoron uzeblan en malprofundaj riveroj. La kompanio inventis kaj fabrikas porteblan dentan seĝon kiu pezas nur 16 kilogramojn! Tiu seĝo uzas sunan energion. La kompanio nun




La regiono en Ekvadoro kie la tribo loĝas.

preparas aŭton kiu povas flugi. Oni povas veturi sur la aŭtovojo, kaj kie ne estas aŭtovojo oni alfiksas la flugilojn kaj la aŭto jam estas aviadilo. (Vi povas viziti la retpaĝon de la kompanio de Steve Saint. Skribu "I-TEC".)

La murdistoj rakontis al Steve ke dum ili buĉis lian patron kaj la aliajn misiistojn, ili vidis distance "fremdulojn" ŝvebantajn super la arboj. Iu murdisto diris al Steve: "Tiam ni eksciis ke ni faris ion tre malbonan." Nur la triono de la Waodani estas kristanoj, sed jam longe la tuta tribo per la influo de la kristana fido ĉesis hommortigi.

Nuntempe, fremduloj vizitas la tribon sen iu ajn danĝero. Kelkfoje, Steve Saint akompanas la vizitantojn. (Li loĝas nuntempe en la ŝtato Florido kie li havas sian kompanion.) Dum unu vizito, fremdulo aŭskultis klasikan muzikon per sia magnetofono. Unu el la murdistoj ankaŭ aŭskultis la muzikon. Subite li eksidiĝis kaj ekkriis: "Tiu muzikaĵo, bonvolu ludi ĝin denove." Poste li diris: "la 'fremduloj' ŝvebantaj super la arboj ludis la saman muzikaĵon dum ni mortigis la misiistojn!" Dio sendis siajn anĝelojn kiuj akceptis la martirojn kun bela muziko kiam ili triumfe eniris la ĉielon! Ĉe Dio, tiuj misiistoj ne vane mortis.

*Grandvalora en la okuloj de la Eternulo estas la morto de Liaj fideluloj.*

(Psalmo 116:15)

# Plurŝtupa akcepto de kristanismo en Svedio

Leif NORDENSTORM, SE

ARNE, LA ĈEFIDO, romano por infanoj kaj plenkreskuloj, unue eldonita en 2005 aperos en nova eldono. Tial estas taŭga tempo por iom komenti la fonon de la libro: la alveno de misiistoj al Svedio.

En la pasinta tempo oni ofte pensis ke Svedio iam ŝanĝis religion: pro la alveno de misiistoj, el kiuj Ansgar (801-865) estis aparte grava. Antaŭ la alveno de la misiistoj ĝi estis pagana, aŭ eble oni preferas la esprimon praskandinava. Post la alveno de misiistoj ĝi fariĝis kristana.

### Plurŝtupa akcepto de kristanismo

Esploristoj lastatempe tamen konsciiĝis ke la transiro de unu religio al alia estas multe pli komplika afero, ol oni antaŭe supozis. Unue oni ne tute klare scias *kia* estis la praskandinava religio, de kiu okazis la transiro. Oni rimarkis ke la praskandinavoj dum sia tuta prahistorio havis kontaktojn kun popoloj, kiuj vivis pli sude. Jam jarcentojn antaŭ la kristaniĝo nordiano prunteprenis ideojn el kristanismo. Ideojn pri la fino de la mondo kaj la ekesto de la nova mondo oni trovas en Völuspá (aperinta en Esperanto en ISLANDAJ PRAVOĈOJ) en la Poezia Edda. La ideoj estas tiel similaj al la evangelio de Mateo ke oni ne povas kredi ke estas nur koincido.

Do, ni povas konstati ke tiuj, kiuj unue alportis kristanajn ideojn al Skandinavio, ne estis misiistoj, sed nordianoj, kiuj revenis al sia hejmregiono post komercaj vojaĝoj. Verŝajne tiuj, kiuj revenis post rabaj vojaĝoj ne utiligis la vojaĝojn por konatiĝi kun la religio de la vizitataj landoj.

La dua grupo, kiu alportis kristanismon al Skandinavio, verŝajne estis kristanaj sklavoj, kiuj estis perforte kondukitaj aŭ venditaj al Skandinavio. En la kroniko de Ansgar oni povas legi ke li renkontis kristanajn kaptitojn en Skandinavio. Ni tamen malmulte scias pri tiuj homoj, ĉar skribistoj tiatempe malmulte interesiĝis pri sklavoj. Ni povas tamen diveni ke iuj el la sklavinoj edziniĝis al viroj en la lando kaj tial ili komencis eduki siajn infanojn kristane.

Nur en la tria vico venis misiistoj, kiuj propagandis la novan religion.



Leif Nordenstorm    Foto el Vikipedio (sveda)


**Diverskiala akcepto**

Ankaŭ kiam temas pri la akcepto de la nova religio la scienco devis reinterpreti la okazintaĵojn. Kristanismon akceptis la praskandinavoj de tute malsamaj kialoj. Por kelkaj homoj la konvinkiĝo pri la vereco de la nova religio estis decida.

Tamen por multaj homoj la deziro havi pli da kontaktoj kun cetera Eŭropo estis pli grava. Por la plejmulto verŝajne ne estis ebleco elekti, sed ili simple sekvis la decidon de diversnivelaj ĉefoj. Ekzistis ankaŭ la ideo ke la skandinavaj dioj havis influon nur en Skandinavio. Vojaĝante al alia lando oni devis kredi je aliaj dioj. En ORM LA RUĜA, Orm kaj liaj kompanoj oferas al Ägir, Sankta Jakobo kaj Allah antaŭ ol veturi al la Iberia duoninsulo por esti tute certaj pri bona vetero. Tre praktika solvo!

**Restaĵoj**

La fina akcepto de kristanismo ne signifis ke la malnova religio tute malaperis. La malnovaj dioj, kiel ekzemple Toro, pluvivis en popolaj fabeloj. La supernaturaj estaĵoj je malpli alta nivelo, kiel ekzemple troloj, elfoj k.t.p. plue havis rolon en la popola kulturo. La sankaj lokoj daŭre estis sanktaj: oni plurloke konstruis preĝejon en la malnova oferejo. La fontoj, kiuj antaŭe estis dediĉitaj al praskandinavaj diinoj, dediĉiĝis al kristanaj sanktulinoj.




Alia problemo pri niaj scioj pri la praskandinava literaturo estas ke kaj la Poezia Edda kaj la Proza Edda (aperinta en Esperanto) estis kompilitaj en la 1200-aj jaroj, kiam Islando delonge estis kristana. La influo de mezepoka rakonta tradicio estas evidenta.

Cetere, ankaŭ Ansgar ne estas tute fidinda en siaj rakontoj pri la aventuroj en Svedio. Eĉ misiistoj iam plibonigas siajn rakontojn por montri kiel danĝera estis la tasko.

Esperantistoj, kiuj volas legi pri la religiŝanĝo en Svedio kaj pri praskandinava literaturo povas elekti inter pluraj titoloj.

**Menciitaj libroj**

Arne, la ĉefido. Dobřichovice: Kava-Pech. 2005. (Baldaŭ nova eldono ĉe Eldona Societo Esperanto.)

Islandaj pravoĉoj. Malmö: Eldona Societo Esperanto. 1964.

La Edda de Snorri Sturluson. New York: Mondial. 2008.

Orm la ruĝa. Stockholm: Eldona Societo Esperanto. 1989.

ଓ

# Vizito al somera kirko

Bengt Olof Åradsson, SE

En Svedio kelkaj preĝejoj malfermas siajn pordojn ĉiu-somere por preterpasantoj. Plej ofte estas malnovaj, vizitindaj kaj kulture interesaj kirkoj kiuj invitas turistojn fari paŭzon dum sia vojaĝo.

Kiam eblas mi provas kapti ĉiun eblecon viziti tiujn somerajn "vojkirkojn". Okazas ke mi planas mian vojaĝon laŭ iliaj situoj kaj malfermaj horaroj. Por mi ankaŭ gravas ke plej ofte en apuda eklezia domo eblas kaftrinki kaj manĝi hejme bakitajn kukojn. Ofte estas gejunuloj kiuj post sia lerneja semestro iom laboras servante la vizitantojn.

Pro tiu somera agado de la Sveda Eklezio mi vizitis kelkajn alie neniam vizititajn vilaĝojn kaj preĝejojn kaj eklernis iom pri nia religia kaj kultura historio.

Ĉi-somere mi vizitis la malnovan preĝejon de Ignaberga. Ĝi situas en suda Svedio, 100 km norde de Malmö. Supozeble la plej malnovaj partoj de la konstruaĵo estas de la 12-a j.c. Por ni svedoj tio estas impona aĝo. Tio ankaŭ montras la periodon kiam la kristanismo jam fortiĝis en Svedio. Oni forlasis la unuajn lignajn konstruaĵojn kaj konstruis novajn per ŝtonoj.


Ignaberga preĝejo, la suda flanko

Pro la reformacio oni ofte forigis artaĵojn kaj kovris la pentritajn murojn per blanka farbo. Restas nuntempe nur partoj de la pentraĵoj kaj kelkfoje ankaŭ oni retrovas malnovajn skulptaĵojn de la tempo antaŭ la reformacio. ☙

Maldekstre: Maria kun sia infano. Dekstre: ligna skulptaĵo verŝajne de Jesuo (13 j.c.)



Malnova baptujo (12 j.c.) Muso tenas informilon por la vizitantoj.



# SVITAVY


Malnova urbodomo kaj domo "Ĉe la Maŭro

La urbo de 63-a kongreso de KELI (3. - 10. 8. 2013) atendas Vin kun multaj historiaj kaj kulturaj lokoj. Se Vi ne estas en la suba nomlisto kaj volas partopreni, sendu rapide aliĝilon (publikigita en Dia Regno 5/2012).

El Vikipedio:
**Malnova urbodomo** – origine renesanca konstruaĵo kun turo, amplekse rekonstruita post incendio en 1781 kaj sekve en 1849. Por sia celo ĝi servis ĝis 1933 (krome en ĝi parte troviĝis ankaŭ urba monŝparejo, juĝejo, policejo kun malliberejo), nuntempe ĝi uzatas por komercaj celoj. Sur fasado de la urbodomo estas lokigita blazono de la urbo (kapo de virkapro inter du turoj), surture troviĝas turka duonluno.

# Aliĝintoj al KELI-kongreso Svitavy, 3. – 10. aŭgusto 2013

1. Stamm, Sieglinde AT
2. Hamajdová, Jaroslava CZ
3. Oláh Margit Judit RO
4. Popoviciu, Eugenia Ecaterina RO
5. Farkas, Antal RO
6. Polnický, Pavel CZ
7. Bagi, Irén HU
8. van Dijk, Els NL
9. Borsboom, Ed NL
10. Birta, Sabolciu RO
11. Pospíšil, Václav CZ
12. Cousson, Philippe FR
13. Ojasild, Endel EE
14. Ojasild, Joonatan EE
15. Scurt, Terezia Ildiko RO
16. Laszlo, Maria RO
17. Sandoz, Andreo CH
18. Krüger, Siegfried DE
19. Ráczkevy-Eötvös, Ágnes HU
20. Åradsson, André SE
21. Åradsson, Bengt Olof SE
22. Chrdle, Petr CZ

# Tutmonda ortodoksa ligo esperantista/ T O L E /

## Feliĉan novjaron kaj sukcesan daŭrigon!

Estimataj kaj karaj Gefratoj, Akceptu miajn kaj nome de TOLE, BEA, AIS-Bulgario kaj Internacia Universitato Karlovo tutkorajn bondezirojn por sano, feliĉo, sukcesoj en Via profesia agado kaj privata vivo, bondezirante ankaŭ sukcesplenan kaj prosperan, por la ekumena E-movado, Novan 2013-an Jaron ! Dio benu vin kaj viajn familianojn!

Kun ĝojo mi deziras sciigi Vin, ke mi estis invitita kaj partoprenis la solenan sesion de Bulgara Akademio de la Sciencoj honore al la 150-jara datreveno de la naskiĝo de prof. Ivan Ŝiŝmanov. Mi kaj ankaŭ aliaj partoprenantoj estis surprizataj pri la prezentita honoro al mia scienca kaj ekumena agado – mi estis alvokita sur la oficialan tribunon saluti la Solenaĵon tuj post la saluto flanke de s-ino Popova – Vicprezidanto de Respubliko Bulgario!

Ek de nun mi invitas Vin partopreni la simpozion AEPA-2013 kaj la religian seminarion kiam partoprenos ankaŭ eminentaj bulgaraj scienculoj. Ĝi okazos junie en Karlovo. Siatempe ni prezentos pli detalan informon pri la simpozio.

Kun plej koraj salutoj frate brakumante Vin
Restas amike Via

Prof. Boĵidar Leonov
leonov@rozabg.com

## La Aŭdebla Biblio progresas (raporto je la 21.1.2011)

| | | |
|---|---|---|
| Ĉapitroj legitaj: | 1109 | |
| Ankoraŭ ne legitaj: | 80 | |
| Entute: | 1189 | (93.3% finita) |

Pli da informo ĉe: personal.southern.edu/~caviness/AudeblaBiblio.htm

# Informejoj

## Novaĵo el la Esperantomuzeo en Vieno

Nombro de skanitaj revuoj en interreto daŭre kreskas

Jam de pluraj jaroj la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko kontinue skanas kaj enretigas malnovajn Esperanto-gazetojn por faciligi la aliron al tiuj historiaj fontoj. Sekve jam 25 diversaj gazetoj estas senpage legeblaj pere de la retejo de la Esperantomuzeo. Oni ne devas ie registriĝi, sed nur alklaki la ligilon de la dezirata gazeto kaj tuj oni povas foliumi kaj legi ĝin. La plej malnova gazeto estas la unua numero de LA ESPERANTISTO el la jaro 1889, la plej nova gazeto estas la sesa numero de ESPERANTO. INTERNACIA REVUO eldonata de Universala Esperanto-Asocio el la jaro 1946.

En 2013 sep pliaj gazetoj estis aldonitaj:

- L' Amerika Esperantisto (1906-1931)
- Kataluna Esperantisto (1910-1936)
- La Revuo Orienta (1920-1940)
- La langue auxiliaire (1898-1914)
- International language (1924-1931)
- Belga Esperantisto (1908-1940)
- Verda Mondo (1925-1935)

La tuta listo de la skanitaj gazetoj estas rigardebla, kiam oni alklakas la ligilon "skanitaj revuoj" (aŭ "Gescannte Zeitschriften online" aŭ "Scanned Esperanto-journals") sur la retejo de la Esperantomuzeo. Pli rapida eblo atingi la liston estas la jena ligilo: http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm

Indas regule viziti la liston, ĉar daŭre aldoniĝas novaj skanitaj gazetoj!

Mag. Bernhard TUIDER
Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum
Österreichische Nationalbibliothek



# *Anna-Liisa Heikkinen*

17.1.1938 - 18.11.2012



Honora membro de EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando), aktivulino kluba kaj oficeja, nia kara Anna-Liisa estas for. Ŝi forlasis nin subite, tute neatendite. En dimanĉo 18.11. kolektiĝis en ŝia hejmo gefratoj Erkki, Anna-Liisa kaj Veikko por intervjuo fare de studento esploranta pri spertoj de milit-rifuĝintaj infanoj. Dum la rememora konversacio, Anna-Liisa suferis malsanatakon kaj revivigo malsukcesis.

Ŝi do pasigis la fruan infanecon parte en Svedio, kiu ofertis panon kaj sekurecon al infanoj en militempo. Reveninte sepjara, ŝi lernis en svedlingvaj lernejoj kaj fariĝinte vartistino laboris en infanĝardeno, aktivante ankaŭ sindikate: Ŝi longe estis prezidantino de *Barnavårdarin-neförening i Finland* kaj estis distingita per la ordeno de Finnlanda Blanka Rozo.


La komplete dulingva juna Anna-Liisa kaptis Esperanton kiel naturan aldonaĵon al sia kulture kaj socie vasta mondo. Kie ŝi aperis, tie oni sentis ĉarmon de aparte vigla, bonvolema klera personeco. Jena historieto karakterizu ŝin: En malfruaj sepdekaj jaroj okazis granda inundo en Ĉeĥoslovakio. Laboranto de Finnlanda kristana helporganizaĵo renkontis ŝokitan junan familion, kiu ĉion perdis, domo, ĉio forflosigita. Ili povis diri nur nomon Anna-Liisa, esperanta amikino en Finnlando; sed adreso, ĉio en la domo estis perdita. Reveninte, tiu laboranto telefonis al EAF-oficejo, trovis Anna-Liisa, kiu tuj kontaktis kaj organizis helpon al la malfeliĉuloj.

Amikeco daŭris dumvive. Vivverko, kara memoro daŭras transvive.

*Tuomo Grundström,*
*Aini Vääräniemi*

# Spirito de Di'

(originale verkita)




3. Spirito de Di',
   ho lango kaj vorto,
   ventego kaj forto,
   ho Sankta Spirit'!
   Ŝtormu, parolu el mi.

4. Spirito de Di',
   intimo de l' koro,
   animo-mentoro,
   ho Sankta Spirit'!
   Spiru kaj preĝu en mi!

*La lastan linion oni kutime ripetas.*

SPIRITO DE DI' • M (Die Dämmerung fällt): el la junularmovado ĉ. 1930, eble de K. A. Christel (kaj Helmut König) • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2012-10-01